

esperanto

julio-aŭgusto 1998

61-a jaro

n-ro 762-3 (7-8)

universala esperanto - asocio (en konsultoj) rilatoj kun U.E.S.O.

**William
Auld : p. 104**



ESPERANTO

revuo internacia

Vi trovos

sur la sekvantaj paĝoj tre gravan iniciaton pri kreo de baza laborkapitalo por UEA en la sumo de 500 000 guldenoj. Legu ĝin!

En la kadro de la Jaro de Homaj Rajtoj la du notoj pri lingva diskriminacio (p. 98 kaj 101) denove altiras la atenton al tiu ofte prisilentata maljustaĵo. Ligita al la demando de oficialaj lingvoj estas ankaŭ tiu pri la kosto de plurlingvismo, pri kiu la Centro de Esploro kaj Dokumentado kontribuas pliajn konsternajn ciferojn (p. 101).

Raportoj pri gravaj kongresoj kaj konferencoj en Bulgarujo, Polujo kaj Usono aperas sur p. 98-100. Ĉu ankaŭ vi foje parolas antaŭ kongreso aŭ alia kunveno? Se jes, ĉu vi evitis ĉiujn erarojn, kiujn David Curl mencias (p. 102)? Bona 'mikrofonistiko' estas unu el la multaj elementoj, de kiuj dependas efika informado pri la Internacia Lingvo (rezultoj 1967 sur p. 103).

Ni tre bone scias, ke la poezio ne estas ĉiam la plej populara ingredienco de "Esperanto". Sed espereble oni pardonos la dediĉon de unu tuta paĝo al tiu temo, kiam la poemojn ornamas la sprito kaj lingva eleganteco de William Auld (p. 104). Kiu ambicias egalan elegantecon, tiuj bone povas preni kiel unuan ŝtupon la proverbaron (p. 105).

La kovrilo

prezentas fotografian memportreton de la nova redaktoro de "Norda Prismo", antaŭe redaktoro de "Esperanto", "Belarto", "Monda Kulturo" k.a.: William Auld. La redaktan laboron (la unua kajero de "Norda Prismo" sub lia redakto eliris antaŭ kelkaj tagoj) li kombinas kun nova poeta aktiveco: vidu p. 104.

Aliajn bildojn ni dankas al: News Digest (98), Ami keisei (105), Lennart Aberg (110), Jerry Soalt/Mark Starr (111) kaj Welt auf Reisen (114).

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910)

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378984.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1968): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middx, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hållabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk 1, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Germarkenstr. 148, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.



Novan gravan kampanjon por fortikigi la financon bazon de la Asocio lanĉas nun UEA okaze de sia 60-jara datreveno kaj omaĝe al la fondinto Hector Hodler.

La projekto, iniciatita kaj administrata de f-ino M. H. Vermaas (dekstre) kiel Komisiitino por Specialaj Taskoj, celas starigon de laborkapitalo de 500 000 guldenoj (du milionoj da steloj).

Ne ekzistas en la mondo kulturaj organizaĵoj, laborantaj sen iu ajn subvencio, kiuj povas funkcii sen defecitoj nur per siaj membro-kotizoj. Iliaj manoj estas ligitaj pro konstanta monmanko. Prosperas nur tiuj, kiuj trovis aliajn fontojn de enspezoj.

La nuna situacio

Konstanta monmanko regas ankaŭ en UEA, malgraŭ rigoraj elspezlimigoj. Ja plimultigo de laboroj, ekz. pro kampanjoj, ne signifas, kiel en komerco, ankaŭ plimultigon de enspezoj. Grandaj ŝparoj, interalie, reduktis la amplekson de la revuo Esperanto kaj de la Jarlibro kaj tial neeviteble malriĉigis ilin. Estus utile havi imponan revuon, kiu adekvate reflektus la agadojn por Esperanto en la mondo. Multaj aliaj klopodoj restas limigitaj, novaj iniciatoj estas bremsataj pro manko de financaj rimedoj. Jaron post jaro sindediĉe laboras en la C.O. kapablaj homoj en tuttaga deforo je tro malaltaj salajroj. Por la plenumo de ĉiuj agadoj la Asocio grandparte dependas de siaj kunlaborantoj en la C.O., kaj ili meritas konforman kompenson. Jam 2-3 jarojn la C.O. serĉas kvalifikitan libroteniston, bezonatan pro la aĝo kaj sanstato de la nuna funkciulo. Plurfoje ekzistis ebleco je sukceso, sed malhelpis la fakto, ke UEA ne povas pagi salajron adekvatan al la ĝeneralaj normoj kaj bezonatan por vivteni familion. Tamen, kompetenta faka librotenado estas baza kondiĉo por glata funkciado de la C.O.

Nova iniciato

Tial ankaŭ UEA devas trovi fonton de sufiĉe alta plia jara enspezo. Ĝi povas esti nur nova kapitalo, kiu estu investita — plej sekure — en nemoveblaj objektoj produktantaj plej favoran enspezon. Pro la urĝa neceso ŝanĝi la tro delikatan financon situacion, la direktorino iniciatis projekton pri eldono de obligacioj, kiun la Estraro akceptis en sia Printempa Kunsido.

UEA eldonos, en la kadro de aparta Fondaĵo, 500 obligaciojn de po 1000 ned. gld. (4000 steloj, \$ 300 ktp). La Estraro firme fidis, ke en la movado troviĝas 500 personoj kaj instancoj pretaj investi en UEA sumon de 1000 gld. UEA do ne petas *donacojn*, sed principe petas tiujn, kiuj havas je dispono por investo sumon de 1000 gld, *prunti* tiun sumon al UEA, aĉetante obligacion.

La fondo de la nova laborkapitalo ne estas nur momenta solvo de la financa problemo, sed ĝi reprezentas efektivan, konstantan fonton de enspezoj, kiu povos kun la jaroj ankoraŭ kreski.

Ni parolas pri laborkapitalo, ĉar ja ĝi estas bezonata antaŭ ĉio por garanti la ne nur la normalan pluan funkciadon de la asociaj laboroj, sed ankaŭ la entreprenon de aliaj gravaj agadoj, kiuj ne povas esti plenumitaj sen pliaj enspezoj.

Obligacioj

La obligacioj donos malgrandan renton, nome, malpli altan, ol oni ricevas en banko. Tio signifas, ke oni cedas al UEA la diferencon sumon de la akirota rento. Tiu ofero estas nur malgranda, dum la helpo al UEA estas tre granda. Ekzistas ankaŭ personoj, kiuj deziras prunti la sumon entute rezignante pri rento, por helpi al UEA. En ambaŭ kazoj, tamen, la sumo de la obligacio restas posedaĵo de la koncerna persono. La reguloj estas jenaj:

a. Obligacioj de po 1000 gld. je rento de 2%: La aĉetanto ricevas numeritan dokumenton, kiu pravas la pruntan kaj certigas, ke li restas la posedanto de la sumo. La rento pri la pasinta kalendaro jaro estos ĉiujare pagata antaŭ la 1-a de majo. La sumo de la obligacio estos repostulebla plej frue 10 jarojn post la dato de aĉeto, kun unujara antaŭaverto.

b. Obligacioj de po 1000 gld. sen rento: La aĉetanto ricevas similan numeritan dokumenton. La sumo de la obligacio estos repostulebla

Kapitalo Hodler 68

plej frue ses jarojn post la dato de aĉeto, kun unujara antaŭ-averto.

En ambaŭ kazoj estos klare difinite el jura vidpunkto, ke posedanto de obligacio plene konservas siajn rajtojn je la koncerna sumo. Se la posedanto mortas, la obligacio transiras al la heredantoj. Ili ricevas la renton, kaj ili povas, laŭ la supre menciitaj reguloj, repostuli la sumon.

c. Kvankam, kiel dirite, por tiu ĉi celo UEA ne *petas* donacojn, ĝi sendube volonte *akceptos* ilin. Ja ekzistas ankaŭ membroj, kiuj bonvolas unufoje efektive *donaci* sumon de 1000 gld., do rezignante pri posedrajto kaj rento, por helpi la konstruon de tiu ĉi kapitalo. Ankaŭ ili ricevos specialan dokumenton, kiu pruvos ilian partoprenon en tiu ĉi speciala laborkapitalo.

Kontrolo kaj sekureco

Ĉiu partoprenanto — obligaci-havanto kaj donacinto — ĉiujare ricevos apartan jarraporton kun detala financa raporto, farita de renoma revizora firmo, kiu kontrolas la konton de la kapitalo. La akirita kapitalo estos investita en kiel eble plej sekura kaj fruktodona maniero kaj estos ĝis maksimumo protektita kontraŭ inflacio. *Borsaj spekulacioj per ĝi estos severe malpermesitaj.* Ĉio estos fiksita en aparta statuto, kiu garantias la sekurecon de la obligacia kapitalo. Kelkaj kompetentaj personoj estos aparte nomitaj por okupiĝi pri la afero, dum la taskon de la administrado ricevos f-ino Vermaas kiel Komisiito por Specialaj Taskoj.

Obligaci-prenontoj

Ni ne dubas, ke nombro da personoj, amikoj de UEA, kiuj povas malhavi dum kelkaj jaroj sumon de 1000 gld., poste revenontan al ili, pozitive reagos al nia nuna alvoko, partopreni la konstruon de tiu ĉi laborkapitalo. Ankaŭ landaj asocioj kaj lokaj grupoj povas partopreni. Pluraj landaj asocioj havas iom da kapitalo en banko. Ili povus pripensi, ĉu investi unu milon en UEA, kies parto ili estas, kaj kiu senĉese laboras por ke ankaŭ ili povu pli efike labori. Grupoj povus kolekti inter siaj membroj la sumon por aĉeti unu obligacion kaj senti sin pli ligitaj al UEA. Ĉiu, kiu interesiĝas, bonvolu peti pliajn informojn de la C.O.

Honorigo Hector Hodler

Ne hazarde venis la ideo pri la kapitalo nun, en la jaro, kiun markas la sesdekjara ekzistado de UEA. Iam UEA ricevis la grandiozan kapitalon Hodler, kaj longe la movado prosperis pro ĝi. Ĉu estas imagebla pli bela omaĝo al Hector Hodler, ol per kreo de simila kapitalo, kiu povus esti nomita "Fondaĵo Hodler 68"? ! Ĝi estos monumento al la neforgesebla fondinto de UEA. En la jubilea jaro ek al rekonstruo de la legendeca kapitalo Hodler!

LINGVA DISKIMINACIO en la Internacia Olimpa Komitato



Malgraŭ la entrudiĝoj de internacia politiko la Olimpikoj ankoraŭ pensigas pri amika konkurenco, amo al la sporto kaj rigore senpartia justeco. Bedaŭrinde, ne ĉio estas efektive tiel aplaudinda. Lingva diskriminacio troviĝas jam en la statuto de la Internacia Olimpika Komitato, kiu postulas scion de la angla aŭ franca lingvo.

Anakronisma regulo

Laŭ raporto de la franca ĵurnalo 'Humanité' (26 aprilo 68), s-ro Avery Brundage, usonano, prezidanto de la I.O.K., aludis al tiu artikolo de la statuto por atentigi, ke la delegitoj soveta kaj meksika eniris la Komitaton nur kontraŭ la reguloj. La koncerna regulo tekstas jene:

"La Internacia Olimpika Komitato estas konstanta organo. Ĝi varbas mem siajn membrojn el inter tiuj personoj, kiujn ĝi juĝas kvalifikitaj, kondiĉe, ke tiuj personoj parolu la francan aŭ la anglan..."

Komentas 'Humanité':

"La artikolo 10 ne sekvis la evoluon de la Olimpikoj en la direkto al universaligo..."

La sovetiano Andrianov kaj la meksikano Clark Florès, kiuj ja scias paroli ruse aŭ hispane, rompas do tiun regulon, absurdan en la sesdekaj jaroj de la 20-a jarcento..."

Raso, religio, politiko... sed lingvo?

Unu el la fundamentaj principoj de la Olimpikoj parolas pri malpermeso de kiu ajn distingo bazita sur raso, religio aŭ politiko. Sed la egalrajteco de la lingvoj, kiun rekonas la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, restas sen mencio. Kompreneble, — ĉar apenaŭ oni povis en unu artikolo deklari tian principon, kaj jam en la sama dokumento meti diskriminaciajn postulojn pri la scio de la angla aŭ franca.

"Cetere," — tiel konkludas mok-malice la korespondanto de 'Humanité' — "se la regulo postulus scion de la rusa aŭ hispana, s-ro Avery Brundage eble sentus grandan ĝenon..."

En Bulgarujo

la dua plej granda

kongreso de IFEF

Okcent personoj el 21 landoj partoprenis meze de majo la 20-an kongreson de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) en la marborda urbo Varna, Bulgarujo. Tiun nombron superis nur la kongreso en Budapeŝto en 1962 (1004 anoj).

Kiel kutime, la kongresa programo dividiĝis en partojn fakan, kulturalan kaj distran. Krom diversaj fakdiskutoj okazis prelegoj pri tiaj temoj, kiel "Enkonduko de la elektra kaj dizela traktado ĉe Bulgaraj Statfervojoj" kaj "Kelkaj novaj ŝarĝvagonoj kaj ilia elprovo". Okaze de la kongreso aperis Esperanta traduko de la Konvencio pri Fervoja Vartrafiko (Pasintjare aperis tiu pri Pasaĝer- kaj Pakaĵ-Trafiko), kaj "Historio de la Fervojista Esperanto-Movado, 1908-1968", 40-paĝa ilustrita kajero bazita sur manuskripto de d-ro Marek Wajsblum.

Teatraj prezentoj

La kulturalan flankon konsistigis tri teatraj prezentoj. La distraj programoj — interkona vespero, balo, ŝipveturado sur la Nigra Maro, aŭtobusekskursoj k.a. — multe helpis antaŭenigi la reciprokecon amikecon, kiu estas unu el la ĉefaj aspektoj de ĉiu kongreso de IFEF.

INSTRUADO KAJ LITERATURO DE ESPERANTO



Maldekstre: diskutas Joseph Schraibman, Jonathan Pool, Humphrey Tonkin kaj Duncan Charters (parolanta).

Semajnfina konferenco organizita en la Universitato de Indiana, Bloomington, 19-21 aprilo 1968, profunde konsideris la evoluon de instrumentado kaj literaturo de la Internacia Lingvo. La diskutojn partoprenis pluraj profesoroj de tiu kaj aliaj universitatoj. La Junularo Esperantista de Nord-Ameriko, kiu planis la aranĝon, eldonos raporton kaj sonbendojn de elektitaj programeroj.

Diskuto pri "Perspektivoj de la Esperanta literaturo" komparis ĝian evoluon kun tiu de nacilingvaj literaturoj kaj ekzamenis la valoron de Esperanto kiel traduklingvo. Partoprenis UEA-membroj Duncan Charters kaj Humphrey Tonkin, unuflanke, kaj profesoroj J. Schraibman kaj M. Sheviak (Indiana), aliflanke.

La partoprenantoj povis rekte sperti la efikecon de nova kurso ellaborata de Duncan Charters sub la titolo 'Modern Esperanto'. En la lingva laboratorio de la Universitato (kun 190 budoj kaj 10 000 instrubendoj — kredeble la plej granda en Usono) ili studis dum unu horo, dialogante kun sonbendoj. Poste ili havis okazon observi klason da studentoj en la laboratorio, kiuj komencis sen ia ajn scio de Esperanto kaj post unu horo jam konversaciis en la kadroj de la instrumaterialo.

Diskutojn pri instrumentadoj partoprenis profesoroj D. Quilter (Indiana) kaj H. French (Suda Illinois). Prelegoj de Humphrey Tonkin pri "Esperanto hodiaŭ", de E. James Lieberman pri "Psikologiaj aspektoj de Esperanto-lernado" kaj de Eleanor Higginbottom pri "Norma prononco en Esperanto" kompletigis la plenŝtopitan kaj tre fruktodonan programon.

FAMILIOJ KONFERENCIS



**Gepatra
Bulteno
interligas
familiojn,
en kiuj
Esperanto
estas hejma
lingvo.**

Reprezentantoj de 12 familioj, en kiuj Esperanto estas unu el la hejmaj lingvoj, kunvenis en aprilo en Polujo kun aliaj interesitoj por diskuti siajn spertojn. La renkontiĝo, kiu aparte altiris la atenton de la Pedagogia Fakultato de la Universitato en Toruń, rekomendis pli da tiaj kontaktoj kaj pli vastan diskonigon de 'Gepatra Bulteno', kiu aperadas sub aŭspicio de UEA.

Vortaro de hejmaj objektoj

La kunvenon, titolitan 'Unua Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj', ĉeestis kvindek da personoj el Bulgarujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Japanujo kaj Polujo. Krom ĝenerala enkonduka referaĵo de unu el la pedagogiaj fakuloj de la Universitato la ĉeestantoj aŭdis raporton de Stefano Nemere pri la kompilado de 'hejmaj terminaroj'. Tiajn terminarojn hungara-Esperantan kaj pola-Esperantan la raportinto jam kompilis.

Lernado antaŭ la naskiĝo!

Fakte jam antaŭ la naskiĝo de infano devas komenciĝi en esperantlingva familio la preparoj por lia lingvo-lernado. La gepatroj devas funde sin prepari per konatiĝo kun ĉiuj vortoj, kiuj povas montriĝi necesaj en kiu ajn situacio. Tiel konkludis la diskutantoj en Toruń.

Donacabonoj por Gepatra Bulteno

Aliaj temoj tuŝitaj estis: la problemoj, kiel konservi ekvilibron inter la nacia lingvo kaj Esperanto, kaj la diversaj edukaj rezultoj de internacilingva medio por la infano.

La regule aperanta, sed ĝis nun ne sufiĉe subtenata 'Gepatra Bulteno' frontas la samajn problemojn, kiel aliaj Esperanto-gazetoj: granda parto de ĝia potenciala legantaro troviĝas ĝuste en tiuj landoj, kiuj malfacile transpagas al Nederlando. Tion aparte bedaŭris la konferencanoj. UEA volonte akceptos donacabonojn (3,50 gld.; 14 st.) por ebligi al familioj en tiaj landoj tamen konservi la nove fortikititan kontakton kun samspecaj familioj alilandaj.

Biblioteko de ISAE monde konsultebla

La riĉa biblioteko de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista — unu el la Aliĝintaj Fakaj Asocioj de UEA) de nun pruntedonas siajn materialojn al kiu ajn lando de la mondo. Tion ebligis grava subteno flanke de la pola universitato Toruń.

En oktobro 1966 establiĝis lektorato de Esperanto en la universitato de Toruń, kie ĝis tiam ekzistis nur studenta rondo. La sukceso de la lektorato kaj de la tri internaciaj studentaj seminarioj, kiujn la Esperanto-rondo organizis en la lastaj jaroj, tre altigis la prestiĝon de Esperanto ĉe la universitataj aŭtoritatoj. Rezulto: ili interkonsentis kun ISAE pri transpreno kaj administrado de ĝia biblioteko kaj pri subtenado de la Informa Centro de ISAE.

Universitato pagas ĉiujn kostojn

La biblioteko de ISAE nun troviĝas en la kadro de la universitata biblioteko en Toruń. De tie ĉiuj sciencistoj povas pruntepreni pere de la normalaj internaciaj bibliotek-interŝanĝoj. La universitata biblioteko pagas la administradon kaj katalogadon de la kolekto, kaj jam aĉetis ĉ. 200 librojn kaj gazetojn en Esperanto por kompletigi ĝin.

Ankaŭ la Informa Centro de ISAE nun funkcias je la kostoj de la Universitato. Ĝi celas informadi pri la uzo de Esperanto en la scienco kaj publikigi sciencajn informojn. Ĝi ankaŭ respondecas pri la kolektado de materialoj por la biblioteko de ISAE. Interalie ĝi jam aranĝis ekspozicion pri Esperanta literaturo en la kadro de la 4-a studenta seminario en la jusa aprilo. La gvidanto de la Informa Centro ricevas ankaŭ pagitan libertempon por ĉeesti diversajn Esperanto-aranĝojn.

Informpetojn volonte plenumas: Informa Centro de ISAE, s-ro István Nemere, Universitata Biblioteko, Toruń, ul. Chopina 12/18, Polujo.

INFORMOJ DE

CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono (01) 904 9081.

KOSTO DE PLURLINGVISMO

La Konferenco de Unuigintaj Nacioj por Komerco kaj Disvolvo, antaŭ nelonge okazinta en Nov-Delhio, kostis, laŭ la buĝeto de UN, pli ol du milionojn da dolaroj. La duono de tiu elspezo ŝuldiĝis al la paralela uzo de kvar lingvoj. Kvindek kvin interpretistoj, 44 reviziistoj kaj 132 tradukistoj flugis al la hinda ĉefurbo; kosto (salajroj, vojaĝelspezoj, vivkosta monkompenco): 878 500 dol. Aldoni la 292 500 dolarojn necesajn por aperigo de la konferencaj dokumentoj en la franca, hispana kaj rusa jam signifas altiĝi la sumon super \$ 1 000 000, eĉ antaŭ ol konsideri la kostojn ligitajn al tajpado de la dokumentoj kaj al dungo de 190 ekstraj interpretistoj, reviziistoj kaj tradukistoj speciale varbitaj por la Konferenco.

La Konferenco pri Homaj Rajtoj

La Internacia Konferenco pri Homaj Rajtoj (Teherano, aprilo-majo 1968) postulis la servojn de 22 interpretistoj, 59 tradukistoj, 17 reviziistoj, 96 tajpistinoj, 6 ĉinlingvaj skribistoj kaj 5 lingvo-sekretarinoj, je suma kosto de 430 000 dolaroj. Se oni adicias la ciferojn rilatantajn al plurlingvismo en la konferencoj, kiujn UN organizas en 1968 — internacia konferenco pri homaj rajtoj, konferenco de ministroj pri socia protekto, internacia konferenco de plenrajtigitoj pri la juro de traktatoj, konferenco de UN pri la esplorado kaj paca utiligo de la eksteratmosfera spaco, internacia konferenco por revizio de la konvencio pri vojtrafiko — oni atingas sumon de \$ 1 023 075, kio ne inkluzivas la nov-delhian konferencon, evidente.

Konstanta oficistaro pri lingvoj

Tiuj ciferoj koncernas sole nur la konferencajn elspezojn kaj tial prezentas nur malgrandan parton de la tuta lingva buĝeto. Unuigintaj Nacioj konstante utiligas la servojn de granda nombro da lingvaj oficistoj: 436 en la servoj interpreta kaj traduka en Nov-Jorko, 221 en la lingva fako en Genevo. Necesas aldoni la tradukistojn/interpretistojn de la regionaj ekonomiaj komisionoj (Bankoko, Adisabebo, Santiago...), kiuj ne aperas aparte en la buĝeto. Jam nur por pagi tiun personaron UN elspedas \$ 6 700 000 en 1968. Tiu sumo ne enhavas la lingvajn servojn de la Organizaĵo por Industria Disvolvo, establita en Vieno, kiuj postulas — se enkalkuli la personaron

provizore dungotan por la dua sesio de la Konsilo pri Industria Disvolvo — \$ 922 164.

Se adicii ĉiujn ĉi donitaĵojn, oni atingas la sumon de \$ 9 700 000 kiel sumon de la kostoj, kiujn UN devas fronti en 1968 pro sia lingva regularo.

Aliaj internaciaj organizaĵoj

La sama situacio aperas ankaŭ en aliaj internaciaj organizaĵoj. Dum 1968 kaj 1969 la traduka fako de la Organizaĵo por Nutraĵoj kaj Agrokulturo (FAO) kostos \$ 1 434 900. Ĉe la Monda San-Organizaĵo (WHO/OMS), pli ol unu miliono da dolaroj estos dediĉitaj en 1968 al traduko kaj interpretado kaj al aliaj laboroj, kiujn kaŭzas la neceso eldoni ĉiujn dokumentojn de la organizaĵo plurlingve. Zorga pristudo de la buĝeto de Unesko permesas konstati, ke ĝia plurlingvismo kostas en unu jaro ĉ. 2 1/2 dolarmilionojn.

Oni povas taksu je minimume 18 dolarmilionoj la ĉiujarajn kostojn de plurlingvismo en la UN-familio. Ne estas konate, kian ciferon oni atingus, se estus enkalkulitaj la aliaj interŝtataj organizaĵoj: Eŭropa Ekonomia Komunumo, Eŭropa Asocio de Libera Komerco; Organizaĵo de la Nord-Atlantika Traktato, Eŭropa Konsilo, Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, Organizaĵo por Afrika Unueco, Internacia Normiga Organizaĵo, ktp, ktp.

La kostoj altiĝas

En ĉiuj internaciaj organizaĵoj evidentiĝas kresko de la lingvaj kostoj. La organizaĵoj ligitaj al UN havis komence nur du laborlingvojn: la anglan kaj la francan. Preskaŭ ĉiuj poste aldonis la hispanan kaj la rusan, kaj kelkaj la araban. En la buĝeto de la Monda Meteorologia Organizaĵo por 1968-1971 estas enskribita nova kredo de \$ 1 623 482 nur "por plibonigo de la lingvaj servoj", dum la pliligo por la konkretaj agadoj de la Organizaĵo sumiĝas je \$ 2 228 584.

PERSEKUTOJ KONTRAŬ LA INTERNACIA LINGVO

La unua parto de la studo sub tiu titolo, aperinta en la februara "Esperanto", p. 14-15, menciis la informon de "The Observer" pri forigado de esperantistoj en 1940 el la baltaj respublikoj al malproksimaj partoj de Soveta Unio.

La kunlaboranto de CED mag. Isaj Dratwer atentigas, ke en la libro "Hexensabbat" de d-ro Alex Weissberg-Cybulski (1901-1964) aperis simila informo pri persekuto al esperantistoj en la jaroj 1936-1939. Laŭ tiu aŭtoro, Stalin difinis inter aliaj grupoj "purigotaj" la grupon 5: "Homoj konantaj eksterlandon kaj antaŭmilitajn tempojn, havantaj parencojn kaj amikojn eksterlande kaj korespondantaj kun ili. Filatelistoj kaj esperantistoj." (Traduko laŭ la pola eldono "Wielka czystka", Parizo, Instytut literacki, 1967. P. 562.)

MIKROFONISTIKO

En ĉiu publika arango — en kongresoj, en societaj kunvenoj, en informprelegoj, en diversaj konkursoj — okazas de tempo al tempo iaj malharmonioj inter la naturaj kapabloj de la homoj, unuflanke, kaj la postuloj de diversaj teknikaj helpiloj, aliflanke. Egale, ĉu temas pri etaj malperfektaĵoj aŭ pri katastrofaj fuŝoj, la konsiloj de David Curl (profesoro en la Universitato de Okcidenta Michigan, Usono) povas helpi.



Ne estas malfacile sekvi la regulojn por modela uzado de mikrofono — se temas pri unu mikrofono... kaj pri unu parolanto. Gravaj neŭrozoj povas rezulti el penado teni la buŝon je egala distanco for de kvar mikrofonoj samtempe!

Unu el la plej malagrablaj kaj ĉagrenaj eraroj por kiu ajn aŭskultantaro estas la misuzo de la laŭtig-sistemo. Kompreneble, la aŭskultantoj nekonscie provas adaptiĝi al voĉo tro mallaŭta aŭ tro laŭta aŭ iel misformita. Iom post iom, tamen, la penado ĝenas, kaj tiam la aŭskultantoj komencas kritiki la parolanton aŭ respondeculojn kaj ne plu atenti, kion oni diras.

Se la parolanto kuras sur la podio inter mikrofono, ekranu kaj nigra tabulo, aŭ se li daŭre svingas la korpon kaj turnas la kapon jen tien, jen aliflanken — lin la ĉeestantoj certe ne povos aŭdi. Se li nepre devas moviĝadi, li postulu porteblan mikrofonaĵon, ekzemple pendigeblan ĉirkaŭ la kolo. La sola valida preteksto por turni sin for de la mikrofono estas la bezono terni aŭ tusi. Amplifita tuso povas konsterni la aŭskultantojn kvazaŭ kanoneksplodo!

Specialaj efektoj

Spertaj parolantoj lerte variigas sian voĉon. Ili scipovas jen krei intime-konversacian efekteton per normala voĉo apud la mikrofono, jen eksciti la aŭdantojn per aparta krescendo. Notu bone, kiel tia spertulo iom retiras sin de la mikrofono por paroli laŭte. Ĉiu bone perceptas, ke li laŭtigas la voĉon, sed tamen ne surdiĝas pro subita bruego.

Spiro-sonoj, eksplodetoj, troa resonado kaj siblado — ĉiuj rezultas el troa proksimeco al la mikrofono kaj el rekta parolado en ĝin. Multe pli bone estas direkti la voĉon iom super aŭ preter la mikrofonaĵon. Teni la kapon ĉ. 30 cm for de la aparato eliminis la spiro-sonojn.

Nepre tenu la manojn for de la mikrofono

kaj ne movetadu la notojn aŭ aliajn paperojn. Kaj ne tamburetu per la fingroj sur la pupitro aŭ ludu per ŝlosiloj aŭ simile. Eĉ tute etaj sonoj de tiu speco povas fariĝi embarase laŭtaj pro la mikrofono.

Demandoj al la preleganto

Por podiaj diskutoj kaj forumoj plej taŭgas po unu mikrofono antaŭ ĉiu parolanto. Tio ebligas eviti la ĝenan interŝovadon kaj ĝustigadon antaŭ ĉiu nova paroladeto. Kion fari pri intervenoj kaj demandoj de la aŭskultantoj? Verŝajne la plej simpla metodo estas antaŭe peti, ke la podia parolanto ripetu aŭ resumu ĉiun intervenon, antaŭ ol li donos sian respondon. Tiamaniere ĉiu ĉeestanto povos klare aŭdi ne nur la respondon sed ankaŭ la demandon.

Sin ekzerci per magnetofono

Por lertiĝi en la uzado de mikrofono plej bone servas magnetofono. Oni povas private lerni la ĝustan teknikon. Aŭskultante la bendon, oni facile rimarkas tiujn momentojn, kiam oni parolis tro mallaŭte aŭ tro laŭte aŭ forturnis sin de la mikrofono. Malbonaj ecoj tuj fariĝas embarase evidentaj. Tia sin-ekzerco per magnetofono estas aparte frukto-dona ĉe tiuj parolantoj, kiuj kutimas voĉlegi siajn prelegojn. Nenio pli rapide plibonigas la elparolon kaj stilon, ol la devigita aŭskultado al sia propra monotona murmurado. Sin-aŭskultado povas eĉ rezultigi, ke voĉleganto komencas paroli kiel vera preleganto.

David Curl

(Koncizigita traduko el la revuo "Meetings & Conventions", Nov-Jorko, aŭg.-sep. 1967.)

REZULTOJ DE LA INFORMADO 1967

Unu el la ĉefaj taskoj de la Informa Fakto de UEA estas altigi la nivelon de la informado. Ne ĉiam prezentiĝas favoraj eblecoj kiel dum la Jaro de Internacia Kunlaboro. Pro tio estas daŭre necese studi la problemon kaj serĉi novajn vojojn. La fakto, ke du estraranoj okupiĝas pri informado, montras la gravecon, kiu estas atribuita al ĝi.

Antaŭ mi kuŝas la Statistiko pri informado dum 1967, kiun mi kompilas de du monatoj. (Bonvolu vidi ankaŭ paĝon 121 de "Esperanto" 1966 kaj paĝon 108 de 1967.) Bedaŭrinde ankaŭ en ĉi tiu jaro la listo estas nekompleta. Ĉar ĝis la unua limdato, la 15-a de marto 1968 alvenis nur malmultaj respondoj al la kutima detala cirkulero, mi sendis la 1-an de majo eksterordinaran cirkuleron al pli ol 60 landoj post ricevo de intertempe 20 respondoj. Post denove unu monato kaj kelkaj malgrandaj kampanjoj eĉ, la nombro de formalaj respondoj kreskis al 35. Ĉar mi ĉiam komparas kun la lasta jaro, mi devas kun bedaŭro diri, ke ĝis nun ne venis respondoj el jenaj landoj, kiuj sendis bonajn raportojn en la lasta jaro: Aŭstralio, Indonezio, Islando, Israelo, Japanujo, Kolombio, Kongo, Madagaskaro, Monako, Mozambiko, Pollando, Urugvajo, do el 12 landoj. Espereble tiuj raportoj ankoraŭ venos baldaŭ.

Tamen mi donas nun 45 landojn, ĉar el la aliaj landoj mi trovis informojn en mia ĉefe artikola arkivo. Ankaŭ raportis du fakaj organizaĵoj: Esperanto-Ligo Filatelista kaj Ornitologia Rondo Esperantlingva.

Kreskas radio- kaj TV-elsendoj

Kion diri pri la rezultoj? Precipe la rapida kresko de radio- kaj TV-elsendoj (preskaŭ triobligo en 3 jaroj) montras, ke nia informado almenaŭ tiurilate fariĝis pli moderna. Alia fakto de modernigo estas la Informa Centro de UEA en Parizo, kies celo estas kombini la bonajn profesiajn rilatojn de s-ro Bourdeaux en Parizo kun la bona informiteco de la Centra Oficejo en Rotterdam. Ĝi komencis regule eklabori la 1-an de januaro 1968, kvankam jam en 1967 precipe pri la kongresaj raportoj estis bonaj rezultoj.

Pri miaj deziroj al la unuopaj membroj bonvolu denove konsulti la lastjaran artikolon, ili restis la samaj. En la lasta jaro estis enkondukita ankaŭ Respondilo de Individua Kunlaboranto de la Informa Fakto de UEA apud la ampleksa Demandaro pri la informa laboro. Kompreneble ĉiu afero bezonas kelkan tempon por ekfunkcii. Tamen, ke ankaŭ en ĉi tiu jaro nur venis 10 respondiloj, estas bedaŭrinda fakto.

El la 24 demandoj de la Demandaro kelkaj havas nur teknikan valoron, aliaj petas ankaŭ konsilojn por nia plua laboro. Por montri tion, mi elektu demandojn 21 kaj 22: Ĉu vi deziras,

ke dum la U.K. en Madrid okazu speciala kunveno pri informado? Se jes, kiuj temoj estu laŭ via opinio traktataj, kaj ĉu vi povos sendi al tiu kunveno kompetentan reprezentanton? kaj Kiujn ideojn vi volus jam nun prezenti por plibonigi la informan laboron de UEA?

Tago pri informado en Grésillon

En ĉi tiu jaro estos ankaŭ ebleco por pridiskuti respondojn al tiuj demandoj dum la Seminario de UEA en Grésillon, kie tuta tago estas antaŭvidita por informado kaj komunikado.

Esploro estas proponita, ĉu la demandaro laŭ siaj nunaj demandoj trovas aprobon de ĉiuj landaj organizoj, aŭ ĉu ŝanĝoj estu konsiderataj. Alia pripensinda sugesto estas la peto, ke mi indiku al la Informaj Faktoj komence de iu jaro la aferojn, pri kiuj mi intencas kolekti statistikojn jarfine. — Aliaj proponitaj ideoj, kiujn mi donas ankaŭ por via pripensado kaj pri kiuj ne nur la Komisiono pri Informado kaj eventuale la Estraro de UEA, sed ankaŭ niaj kunvenoj kaj la Landaj Informaj Faktoj devas aŭ povas okupiĝi, estas: Eldono de demandiloj en naciaj lingvoj pri Esperanto kaj la lingva problemo. Interŝanĝo de spertoj el la diversaj landoj pri sukcesoj dum kampanjoj. Plibonigo de la tekstoj de la Gazetara Servo de UEA, i.a. per taŭgaj fotoj por pluisendo al la landaj gazetoj. Eldono de Kronologio de gravaj eventoj de la Esperanto-Movado. Varbado inter gastlaboristoj. Ĝemeliĝintaj urboj. Metodoj kaj sistemoj de informado en evolulandoj. Fari paŝojn ĉe sindikatoj kaj aliaj organizaĵoj.

El tio vi vidas, ke oni ne nur faras rutinan laboron, sed daŭre pensas pri plibonigoj. Kelkaj kunlaborantoj trovas, ke la informa laboro de UEA estas bona kaj ampleksa.

Restas tamen la tasko ĉiam plibonigi ĝin, adapti ĝin al la plej novaj bezonoj, sekvanĉe ĉiam la "Principaron de Frostavallen". Ni esperu, ke en ĉi tiu "Jaro de la Homaj Rajtoj" nia informado atingos ankoraŭ pli bonajn poziciojn precipe en la lukto kontraŭ lingva diskriminacio.

Günther Becker,
Estrarano pri informado

Resumaj ciferoj pri informado en 1967:

Parenteze aperas la ciferoj por 1966. Laŭ 45 (36) respondoj de landaj asocioj aŭ kunlaborantoj aperis 3797 (4250) artikoloj kaj 9499 (10 725) informoj en nacilingvaj gazetoj. 1557 (1514) prelegojn ĉeestis 73 255 (74 291) personoj. Okazis 1516 (1051) radio- aŭ TV-programoj. 175 (151) ekspoziciojn vizitis 386 141 (397 735) personoj. Estis disdonitaj 577 532 (657 843) informiloj.



Ok jarojn jam ni atendas novan libron de la plej elstara figuro en la originala Esperanta literaturo de la lastaj jardekoj: William Auld. Ĉi-jare la aŭtoro de 'La Infana Raso' surprizis nin per serio da hektografajoj sub la titolo 'Humoroj'. La sesdeko da subjektivaj poemoj, kiujn ili enhavas, formas la kernon de nova libro. La elektajo ĉi-suba ne estas tipa: en la kompleto oni trovos pecojn multe pli diversajn laŭ stilo, metriko, lingvo – ankaŭ pli pezajn laŭ enhavo. Ni prezentas al vi nun ankoraŭ nur aperitivan...

Novaj verkoj

de William Auld

MI VOLIS DONI
AL VI KELKE
DA VIOLOJ

MANKAS KROTALOJ

Mi ĝojas,
ke ĉi tie ni ne havas
krotalojn.

Ni havas financistojn
politikistojn
ĵurnalistojn
televidon
prudulojn
kaj ankaŭ aliajn
venenaĵojn.
Sed krotalojn
ni ne havas.

La vivo povus esti
eĉ pli malagrabla.

NEĜO

Pestsilenta,
la neĝ' invadas,
venkas la urbon;
kaj ni,
popol' venkita,
marŝas senespere la stratojn
kun nuko kurba
sub jug' de l' okupanta
armeo blanka.

Printempo, helpon!
Kiam ni aŭdos
fanfaron vian
ĉe l' horizonto?

Ne plaĉas
Ofelia
al studentinoj miaj.
Laŭ ili,
ŝi ridinde submetiĝis
al la ordonoj
de sia patro,
kaj ŝi devis
ĉar tion ŝi deziris
amindumi sendiskrete
Hamleton.

Ne tiel facile
frenezigos miaj studentinoj
kiel Ofelia.

Iliaj neŭrozoj
estos pli subtilaj

sed same detruaj

PANEO

Iom post iom
likiĝas aero
el ĉi pneŭmatiko,
la mondo.
Baldaŭ ĝi kunfaldiĝos,
kiel elefanto
senostigita.
Kiu alportos
krikon
kaj rezervan radon
al la paneo
de l' universo?

KIU KAPERIS LA MESALINOJN?

Mi legis pri virinoj sensualaj,
pri Mesalinoj amormalsategaj...
Do kial min vizitas nur normalaj
patrinoj, edzamantaj kaj senpekaj?

Do eble nur mi ilin ne allogas?
Aŭ tro naivas mia vivvizio?
Aŭ la aŭtoroj eble sin apogas
iom libere per la fantazio?

POSTEBRIO

Mi, homo de l' epok', malŝparas
senpense kaj memcentre ĉion:
benzinon, lakton, lumon, grion.
Eĉ amikecon. Kaj ĝi raras.

Da ĝi okshoftojn mi posedis,
disverŝis ĝin disipe, blinde:
post la diboĉo sobriĝinte,
nur soifegon mi heredis.

Disipi: malŝpari.
Okshofto: granda barelo.

Kiom da homoj parolas Esperanton ?

Jen tikla demando, kiun faras preskaŭ ĉiu, kiu informiĝas pri la Internacia Lingvo. Ĉi-sube ni publikigas intervjuon efektive okazintan antaŭ nelonge en Urugvajo. La intervjuato estis akademiano E. Sonnenfeld. Ĝi estu helpo ankaŭ al aliaj !

Jurnalisto: Kiom da esperantistoj estas en la mondo? Ĉu vi taksas ilian nombron je pluraj milionoj?

Sonnenfeld: Pluraj milionoj ja eklernis Esperanton, se ni juĝas laŭ la nombro de lernolibroj venditaj kaj kursoj gviditaj, sed la nombro de tiuj, kiuj fakte scias praktiki la lingvon, restas, miaopinie, sub unu miliono.

J: Sed tio ja estas nombro sensignife malalta...! Post 80-jara ekzisto, kiel do oni povas esperi, ke la lingvo iam konkurencos kun idloj kiel la angla, franca, rusa, germana, hispana, ĉina aŭ eĉ nur la nederlanda?

S: Mi kredas, ke oni eraras, pesante simple ciferojn sed ne esplorante zorge, kion ili sig-

nifas. Mi scias, ke en Montevideo el 1¼ da milionoj da loĝantoj multaj miloj eklernis la anglan, sed kiom el ili scipovas paroli aŭ eĉ nur kompreni ĝin? Ne interesas nin la centoj da milionoj, kies denaska lingvo estas la angla, sed interesas nin, kiom da ne-anglalingvanoj scias facile uzi ĝin? Se la problemoj estas starigita tiel, la nombro de la Esperanto-parolantoj ne estas malgranda. Ili ja ĉiuj estas dissemnitaj en "fremdaj" landoj. Unu miliono da esperantistoj signifas unu milionon da aktive parolantaj unu solan fremdan lingvon tra la tuta mondo. Kiom da milionoj scias aktive uzi iun alian lingvon, kiun ili ellernis por interkompreniĝi kun fremdlandanoj? (Teksto koncizigita. Pri la nombro de esperantistoj vidu ankaŭ majo 1965, p. 89-90.)

VIRINA RIDETO PLI KAPTAS OL

Komparoj — figuroj, metaforoj — estas la viva suko de la lingvo. Trafe elektita komparo povas fari el prozo: poezion, el nura vortsalato: festenon, aŭ el griza prelegeto: festparoladon!

Lingvaj konfekcioj

Ne ĉiu menso, tamen, same lertas en tiaj lingvaj akrobataĵoj. Ne ĉiu trovas sur sia lango la ĝustan komparon en la ĝusta momento. Eble tial amasiĝis en ĉiu lingvo aro da fiksitaj komparoj, lingvaj konfekcioj, kiujn ĉiu povas, trafe aŭ maltrafe, apliki laŭdezure. Certe, efekton de originaleco ili neniam povas havi, sed ili donas ja ian ĉarmon, ian variecon kaj konkretecon al la parolo aŭ skribo. Ni do ne malestimu ilin!


Ĉu ankaŭ vian lingvajon ornamas proverbaj komparoj? Se jes, vi certe povos tuj kompletigi jenajn zamenhofajn komparojn (el Proverbaro Esperanta):

Malsaĝa kiel ——. Sidi kiel sur ——. Flugema kiel ——. Turniĝadi kiel ——. Tute libera, kiel ——. Li ekscitiĝas kiel ——. Ĝi estas kiel — post la manĝo. Vorto donita estas kiel ——. Kuradi kiel ——. Afabla vorto pli atingas ol ——. Virina rideto pli kaptas ol ——. Kolera kiel ——. Malriĉa kiel ——. Ju cerbo pli prudenta, des lango pli ——. Li mensogas tiel, ke ——. Vivi kun iu kiel ——.

Kontrolu viajn solvojn sur paĝo 109. Sukcesintoj rajtas gratuli sin. Nesukcesintoj rajtas pentoferi 5,70 gld. por aĉeto de Proverbaro Esperanta.



Recenzas
Povl Skårup
(Danujo):



SERIO ORIENTO

La spleno de Parizo, de Charles Baudelaire. El la franca tr. Paul Lobut. Serio Oriento-Okcidento N-ro 8 sub aŭspicio de UEA. Eld. Koko, København, 1967. 122 p. 21 x 14,5 cm., bind. per ledeca plasto. 4 ilustraĵoj. 12,50 gld. (50 steloj).*

Nun ambaŭ poemaroj de Baudelaire (1821-67) aperis en Esperanta traduko. En 1957 Stafeto eldonis lian versan poemaron, *La Floroj de l' Malbono*, kaj nun ankaŭ liaj poemoj en prozo estas prezentataj al la internacia publiko. Tiu poemaro origine aperis nur post la morto de la poeto, en 1869, kun la titolo *Etaĵ Poemoj en Prozo*, sed eble la aŭtoro mem preferus la titolon *La Spleno de Parizo*.

La du titoloj bone karakterizas la verkon. Ni retrovas la splenon, kiu estas unu el la cefaj temoj de *La Floroj de l' Malbono*, sed kontraŭe al tiu poemaro *La Spleno de Parizo* estas en prozo. Baudelaire mem diras, ke li "revis pri miraklo de poezia prozo, muzika sen ritmo kaj sen rimo, sufiĉe fleksebla kaj

JAPANA POPOLMUZIKO

Recenzas J. Kohen-Cedek (Jerusalemo):

Sesdek tradiciaj popolkantoj de Japanujo, komp. kaj tr. K. Matuba. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, 1967. 136 p. 21 x 15 cm., ilustr., bind. Kun muziknotoj. 6,— gld.*

Sinceraj komunhomaj sentoj, simple, eĉ ie primitive esprimitaj, abundas en tiu ĉi kantaro. Ne ĉie estas la esperantigo senriproĉa. Apud belaj versoj aperas kelkaj lamaj. Ne kutimaj estas la japanlingvaj "alkantaĵoj", — refrenoj, aŭ onomatopeaj esprimoj, alterne akompanantaj la strofojn. Tamen, la verko malfermas al ni fenestreton en la japanan popolkreadon kun ties delikataj kaj sentoriĉaj lirikaĵoj, melankoliaj popolbaladoj kaj kortuŝaj lulkan-

toj. La japana versfarado ne similas tiun de l' eŭropaj lingvoj. Ne baziĝante laŭ regula alterno de akcentoj, ĝi postulas fiksan nombron da silaboj en la strofo. La akcenton alkondiĉigas la muziko. La sama teksto kantata en unu loko laŭ ascenda ritmo, povas aliloke esti kantata laŭ descenda ritmo. Kiel dum la antaŭklasika periodo de l' eŭropa kantarto, same en la japana, ofte unu silabo estas kanttirata trans multaj sonoj.

*La kompilinto
kaj tradukinto,
Kikunobu
Matuba*



La japana muzika strukturo konsistas el apartspecaj pentatonaj skaloj sen tonduonoj, aŭ el skaloj kvinŝtupaj, kun alterno de duontonaj, plentonaĵoj kaj dutonaĵoj intervaloj.

La ĝenerala kanthumoro estas negaja, kun kelkaj esceptoj. Tion kaŭzis la antikveco de la kantoj de popolo suferinta pro troa laborego, manĝmanko kaj kruela reĝimarbitro. La melodioj estas tre delikataj, dolĉe teneraj, inspirhavaj kaj sentoplenaj, kvankam ne kutimaj por eŭropa orelo. Ilian belecon oni perceptos nur post kelkfoja luda reripeto.

LA REVUO ESPERANTO

principe recenzas ĉiujn pli gravajn novajn eldonaĵojn en aŭ pri Esperanto, kiujn ĝi ricevas en du ekzempleroj. Esceptoj estas religiaj kaj politikaj (t.e. ne-neŭtralaĵoj) eldonaĵoj, kaj vortaroj aŭ lernolibroj, por kiuj ekzistas nur unulanda merkato. Tiajn, same kiel la unuope ricevitajn eldonaĵojn, la revuo nur mencias.

OKCIDENTO: 8

sufiĉe abrupta por adaptiĝi al la lirikaj movoj de la animo, al la ondadoj de la revado, al la ekstremoj de la konscienco". Tiun miraklon la poeto sukcesis fari; ĉu la tradukinto sukcesis refari ĝin?

Traduki tian prozon eble estas tasko pli malfacila, ol traduki versojn, ĉar nek fiksjaj ritmoj nek rimoj kaŝas malpli sukcesajn detalojn. Tiu ĉi traduko ankaŭ ne estas senriproĉa: la recenzanto preferus lingvajon pli konservativan; li foje sentas la gepatran lingvon de la tradukinto sub la haŭto Esperanta, kaj eĉ trovis lingvajn erarojn; kaj li ne ĉiam konsentas kun la tradukinto pri la ĝusta kompreno de detaloj (en la unua poemo la fremdulo volonte amus la belon ne "se diino kaj senmorta ĝi estus", sed "ĉar ĝi estas diino kaj senmorta"). Tamen la atmosfero de melankolio kaj spleno kaj la nuancita muziko de la originalo retroviĝas en la traduko, per kiu Paul Lobut riĉigis nian literaturon de ĉefverkoj tradukitaj.

Praktika vortaro

Recenzas Alfonso Pechan (Budapest):

Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch, de E. D. Krause. Eld. Verlag Enzyklopädie, Leipzig, 1967. 190 p. 13 x 9 cm., bind.* Poŝvortaro Esperanta-germana.

La renaskiĝinta Esperanto-movado en Germana Demokratia Respubliko kaj certe ankaŭ germanlingvanoj el aliaj landoj ĝoje salutas tiun plaĉaspektan, en praktika formato aperintan poŝvortaron. Laŭ la antaŭparolo ĝi enhavas 12 000 titolvortojn. Interesa estas la komparo kun la iom pli granda E-G vortaro de Butin-Sommer, kiu estas pli riĉa ĉefe je vortradikoj sed ne enhavas esprim- kaj frazezkzemplojn, — dum en la vortaro de Krause troviĝas multaj bonaj frazezkzemploj kaj ankaŭ vortkunmetoj, derivaĵoj.

Nekutima, sed praktika estas la alfabetigo. Ĉe samradikaj vortoj (vort-artikolo) ĝenerale oni komencas per tiu vortospeco, kiu ĉefe karakterizas la radikon (substantiva, verba, adjektiva, ktp.). Ekz. *tag'* estas substantiva, do ĝi staras antaŭe, poste sekvas *taga*, *tage*, *tagiĝas*... En ĉi tiu vortaro la vortartikolo estas: *taga*, *tage*, *taglibro*, *tagmanĝi*, *tagmanĝo*, *tagmeze*, *tagmezo*, *tago*, *tagordo*. — Tiu strikta alfabetordo faciligas la trovon por komencantoj, tamen estus rekomendinde iel marki la vorton kun baza karaktero (ekz. per asterisko), ĉar tio donas bonan helpon ĉe eventuala hezito, kiam iu volas diferencigi, ĉu -o signas agon aŭ rezulton de ago.

La vortaro estas bonega, serioza laboro de eksperto; gratulon al li kaj al la kunlaborintaj Esperanto-amikoj de GDR.

ULENSPIEGHEL

- en la

Esperanto de 1500

Recenzas Rinĉen (Mongolujo):

Ulenpieghel, tio estas Strigspegulo. Tr. P. Wolrug. Eld. Vulpo, Amsterdam, 1967. 15 p. Ilustr. 15 cm. 2,— gld.

La aventuroj de Ulenpieghel nun estas konataj tra la tuta mondo, sed por la plimulto da legantoj la malnovaj popolaj eldonoj flandraj estas tute nekonataj. Nuntempe dank' al eldonejo Vulpo ni povas konatiĝi kun malnova antverpena libreto bele ilustrita de samepoka flandra artisto kaj bone tradukita esperantlingven.

Legante, mi pensadis pri la aventuroj de nia ŝercemulo Balansenge, kiun la eŭropaj mongolistoj nomas 'mongola Ulenpieghel'.

La tipografo, studinte mezepokajn presaĵojn, malkovris diversajn ligaturojn kaj mallongigojn, kiuj montras la transiron de la antikvaj skribmanieroj ĉ, gh ktp al la nuntempaj ĉ, ĝ ktp!

Specimena paĝo el "Ulenpieghel"



**Kiel Ulenpieghel dum lia Malsano faris
sia Testamenton. kaj eĉ post lia Morto, E-
terigita, daŭrigis liajn Triponaĵojn.**

MALLONGAJ

RECENZOJ

Recenzas Ueyama masao (Japanujo):

La mirinda eliksiro, novelaro de Johan Hammond Rosbach. Åbyhøj, Dansk Esperanto-Forlag, 1968. 98 p. 22 cm. 5,— gld. (20 st.).*

La kolekto kun la varietea enhavo konsistas el 14 pecoj mallongaj (maksimume 15 p.). Sed, ĉu oni taksas meriton laŭ la longeco, kvazaŭ aserti, ke serpento pli bongustas, ol angilo?

'La mirinda eliksiro': ne ĉiu edzo aĉetu robon por sia edzino, ĉar... 'Rozburgonoj' kaj 'Ink-makulo' vekas nostalgion. 'Antaŭ la pordo' kaj 'La neĝbulo' pikas malfortan, tute homan, kvankam subkonscian punkton de la homoj. 'Uniformo' kaj 'La ruĝa slipo': humuraj tiel, ke eĉ homo kun tro lante funkcia cerbo ekridetos tri horojn post la finlego.

Distilitaj per la sprita plumo, la rakontetoj vestiĝas ŝike, satire, foje humure, sed la aŭtoro ne forgesas kapti la esencon. Kion do plu postuli al noveleto? Ni nomu ĉiujn pecojn unupake Mirinda Eliksiro por konsideri nin mem feliĉaj!

Recenzas A. Warner (Germanujo):

Technisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto (Teknika vortaro germana-Esperanta), de Rudolf Haferkorn. Eld. Esperanto Press, Kanado, 1967. 84 p. 16 x 12 cm., ofsetita. 6,— gld.*

La teknika terminologio en Esperanto suferas je la manko de abunda teknika literaturo. Aliflanke multaj kapablaj fakaŭtoroj estas ĝenataj verki artikolon aŭ libron en la Internacia Lingvo, ĉar taŭgaj fakvortaroj ne estas disponeblaj. Ĝis la industrio kaj komerco speros, ke la Internacia Lingvo estas profitdona komunikilo kaj varbilo, aliaj vojoj — pli modestaj — devas esti surpaŝataj.

La kompilanto, konata pro sia "Scienca kaj Teknika Terminaro (STT)" kaj pro siaj oficoj de Direktoro de la Terminologia Centro de ISAE kaj de la Sekcio "Teknikaj vortaroj" de la Akademio de Esperanto, ekspluatita la multjaran terminologian korespondadon kaj enketadon verkante vortaron germanan-Esperantan, kiu aperis en "Germana Esperanto-Revuo" kiel regula rubriko. Post kiam la tuta manuskripto estis tiel publikigita, Esperanto Press deklaris sin preta eldoni kiel broŝuron la materialon, sed ĝisdatigita. Krome la aŭtoro kompletigis la verkon, aldonante difinojn de radikoj mankantaj aŭ alimaniere difinitaj en la Plena Vortaro kaj Suplemento.

Por personoj scipovantaj la germanan lingvon tiu nova vortaro povas servi kiel ŝlosilo al la teknika literaturo esperantlingva — nome kaj por verkantoj, kaj por legantoj.

KROME APERIS...

politikaj broŝuroj el Pekino ('Antaŭenmarŝo laŭ la vojo malfermita de la oktobra socialisma revolucio') kaj Libano ('Ĉu vi scias? Dudek bazaj faktoj pri la palestina problemoj'). Sialflanke, la katolika organizaĵo CAROSI eldonis ilustritan broŝuron pri sia bonfara agado, okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj. Adreso: Groot Haesebroekseweg 12, Wassenaar, Nederlando.

Novajn ampleksajn vortarojn sendis eldonejo Grafos en Beograd kaj Japano Esperanto-Instituto. Temas pri 'Serbkroata-Esperanta vortaro' de Antonije Sekelj (706 p., ĉ. 35 000 vortoj) kaj la 400-paĝa 'Nova vortaro Esperanto-japana' de Okamoto, reverkita de Nukina kaj Miyamoto kaj kontrolita de Kawasaki.

Modelaj informiloj

Unuaranga eldonaĵo por japanoj estas la parte japanlingva Manlibro de Esperanto, de Sakai matutaro. Ĝi enhavas ĉiajn informojn pri la movado, literaturo ktp., kaj modele enkondukas la komencantojn. La prezidanto de Brita Esperanto-Asocio, d-ro B. Cavanagh, verkis kaj registris same modelan prelegon pri Esperanto en la angla lingvo. Ĝi aperis kiel 18-centimetra disko (33 r/m), kiu daŭras 14 minutojn.

La firmo Camera Talks Ltd. (31 North Row, London, W.1, Britujo) produktas bonkvalitajn filmstriojn por la instruado. El tiuj la serio n-ro 144, 'Basic Languages', konsistas el 12 strioj 35-milimetraj kun koloraj desegnaĵoj por lingvo-instruado. La striojn akompanas multobligitaj notoj por la instruado de la angla, franca, germana, itala, rusa kaj Esperanto (la Esperantaj tekstoj ampleksas ĉ. 15 p.). Interesiĝantoj mendu rekte ĉe la eldonejo (ĉar UEA ne peras). Prezo: £ 31.10.0 plus afranko.

Kantistino Ramona (La Feliĉo) van Dalsem aperigis kiel faldfolion la tekston kaj muzikon de 'Donu al mi...', kiun certe memoras la kongresanoj de la 52-a UK en Rotterdam. En tiu sama tempo aperis kvar novaj grandformataj infanlibretoj el Slovenujo, sed nur nun venis recenzekzempleroj. Titoloj: 'Neĝulino' (Grimm), 'Mojca etulino' (2-a eld.), 'Mia ombrelo povas esti balono' kaj 'Pantoflokantino'. Prezo: po 0,95 gld.

La fako de belliteraturo kreskis ĉimonate per unu vjetnama romano (tamen 446-paĝa!) sub la titolo 'Hon Dat', sceno de batalo en 1961, kaj kritika studo de Petro De-Smedt pri 'Poemtradukoj de H. Vermuyten' (tradukinto de G. Gezelle).

Mortis la plej malnova pioniro

NEKROLOGOJ

GEORGO K. DAVIDOV (1879-1967)

Nur nun ni eksciis pri la morto, en julio 1967, de la plej malnova esperantisto, Georgo Davidov. Oni memoras lin unuavice pro lia privata biblioteko, la plej kompleta dum la unuaj jardekoj de Esperanto, nun malfeliĉe perdita. Grandan valoron havis la katalogoj kaj bibliografiaj broŝuroj, kiujn li eldonis tiutempe. Esperanton li eklernis en 1892. En la lastaj jaroj li loĝis en Moskvo.

I. E. MAJZEL

S-ro I. E. Majzel, multjara sekretario de Leningrada Esperanto-Klubo, mortis en marto, 74-jara, pro koratako.

HARRY S. BLAINE

La 12-an de majo 1968 forpasis s-ro Harry S. Blaine, usona pioniro, multjara membro kaj iama delegito de UEA. Li estis 88-jara.

PETAR GIUNIO (1894-1968)

La 14-an de majo forpasis en Zagreb, 74 jara, s-ro Petar Giunio, ĵurnalisto, aŭtoro de 'Sekretoj de la marestaĵoj'. Li lernis Esperanton en 1956 kaj informadis pri la lingvo en la nacia gazetaro.



Georgo Davidov

VASILIJ PIMENOVIC PIMENOV

Mortis 79-jara la delegito de UEA en Dnepropetrovsk, Soveta Unio, s-ro V. Pimenov. Li lernis la lingvon en 1908.

Kiel peti prospektojn ?

Skribas Hugo A. Lingua (Rosario):

Ni konsideras tre grava la eldonadon de turismaj prospektoj. Tial ni ĉiam petas kvanton por disdoni kun nia revuo 'Lerneja Esperanta Revuo'. Sed nuntempe ni ne povas fari tion, ĉar en 'Esperanto' vi skribas, ke oni petu "ĉe la koncerna turisma oficejo". Nu, por tio oni devus scii, kiel skribi "turisma oficejo" en la diversaj naciaj lingvoj.

Respondas la Redaktoro:

Verŝajne la Esperantaj vortoj "turisma oficejo" estas rekte kompreneblaj en la plimulto da landoj. Tamen ni aldonis en la Jarlibro 1968/I, antaŭ ĉiu lando, la kutime uzatan indikon nacilingvan. (Kelkaj ankoraŭ mankas, kaj kompletigoj estas bonvenaj.)

VIRINA RIDETO (KONTROLO)

Ŝtupo. Pingloj. Vento. Serpento. Birdo aera. Bolanta lakto. Mustardo. Leĝo. Venenita muso. Forto. Reto. Rabia hundo (aŭ: Cento da diabloj). Muso preĝeja. Silenta. La muroj krakas. Hundo kun kato.

Pri Hector Hodler

Skribas Tadeusz Nowakowski (Polujo):

En "Esperanto" n-ro 749, p. 46, oni legas: "... estas dubo, ĉu Hodler finis siajn gimnaziajn studojn, antaŭ ol li tute dediĉis sin al Esperanto". La senco de ĉi tiu konstato povas esti duobla, nome, ke Hodler tute ne finis la gimnazion, aŭ ke li finis ĝin nur poste. En ĉiu okazo ĝi frapas kvazaŭ neakorda kun la "Historio de Esperanto" de E. Privat, laŭ kiu li finis la gimnazion tuj antaŭ la Kongreso de Cambridge, do en 1907, t.e. pli frue, ol kiam li dediĉis sin tute al Esperanto, fondante UEA.

La angla malfavorata

Mario Pei, en "Saturday Review" 6 aprilo 68: "... estas psikologia kaprico de la homa karaktero, ke, kiam al ni ne plaĉas la parolantoj de iu lingvo, same ne plaĉas la lingvo mem... La brita parto de la anglalingva mondo perdis en la lasta tempo ĉiam pli da forto kaj influo; la usona parto fariĝis ĉiam pli malŝatata. Ĉio ĉi sumiĝas je ribelo kontraŭ la angla lingvo — fenomeno ankoraŭ nur ĵusnaskita, sed klare konstatebla."

PERSONE

Molnár

● Ankoraŭ unu internacia ligo per internacia lingvo: s-ro Ladislao Molnár, FD de UEA en Székesfehérvár, Hungarujo, edziĝis la 14-an de aprilo al f-ino Felicja Dąbek el Polujo — ankaŭ ŝi individua membro de UEA.

Newell


● Poeto L. N. M. Newell (el la budapeŝta skolo), nun loĝanto de Aŭstralio, vizitos plurajn eŭropajn landojn kaj la Universalan Kongreson en Madrid ĉi-jare.

Tonkin

● Du gravajn artikolojn anglalingvajn ĵus aperigis Humphrey Tonkin, asistento en la Universitato de Pennsylvania: 'La Esperanta literaturo de post la milito' aperis en la internacia bulteno de P.E.N., eldonata kun subvencio de Unesko; 'Kodo aŭ kulturo: la argumentoj por Esperanto' aperis en usona literatura revuo 'Era'.

Aziaj vizitantoj en Usono: Mark Starr bonvenigas en Nov-Jorko s-rojn Mahant el Hindujo kaj Kim chong-youl el Koreujo. (Detaloj pri la vizitoj aperis en junio, p. 91)

Vaste elis tra la sveda gazetaro la prelegvojaĝo de prof. Rudolf Horsky el Praha (junio, p. 91). De maldekstre: episkopo Sven Danell, s-ro Lennart Aberg, prof. Horsky.



LOKE - FAKE PERSONE

LOKE

Aŭstralio

● Jus formiĝis Esperanto-Klubo en la Universitato de Okcidenta Aŭstralio, Perth.

Ĉeĥoslovakujo

● La 2-an de majo estis aprobita la fondo de Slovaka Esperanto-Societo ĉe la Slovaka Akademio de Sciencoj en Bratislava. La fondo mem atendas ankoraŭ la finon de nure formala proceduro. Pluraj akademianoj jam parolas aŭ favoras la Internacian Lingvon. (Pri la Soveta Akademio vidu "Esperanto", junio, p. 79).

Israelo

● 36 estontaj geinstruistoj partoprenis rapidan Esperanto-kurson en majo en la seminario Sde Boker, en la centro de la dezerto Negev.

Nederlando

● Okaze de la SAT-Kongreso en Utrecht (3-9 aŭg. 68) la loka poŝtoŭicejo uzos dum unu monato nederlandlingvan stampon 'Esperanto — la lingvo por internaciaj rilatoj'.

Soveta Unio

● La fondo de interlingvistika sekcio en la Instituto de Lingvistiko de la Soveta Akademio de Sciencoj, jam raportita en la juna "Esperanto" (p. 79) rezultis el gastprelego en la Instituto de d-ro István Szerdahelyi (Budapest) pri "La objekto kaj limoj de interlingvistiko". Ĉeestis i.a. E. Bokarev, O. Aĥmanova, V. Grigorjev, M. Isajev. La prelego okazis la 24-an de januaro 1968.

● La Ukraina Unuiĝo de Verkistoj subtenas klopodojn de la klubo "Esperanto" ĉe la Ukraina Akademio de Sciencoj, eldoni Ukrainan Antologion en Esperanto. La materialojn kolektitajn de la klubo nun ordigas membrino de la U.U.V., s-ino Nadija Andrianova.

Usono

● La usona fondaĵo Ford anoncis aron da novaj subvencioj al instruado de la angla lingvo en Azio kaj Afriko. Por instruado en Indonezio ĝi jam antaŭe elspezis \$ 1 686 300 kaj nun aldonas \$ 245 000. Por Nigerio kaj Ugando la fondaĵo pli frue donis \$ 1 000 000 kaj donas nun pliajn \$ 165 000.

El prelego en Moskvo de d-ro István Szerdahelyi (foto) rezultis la fondo de interlingvistika sekcio, jam raportita en junio. (Vidu maldekstre, Soveta Unio).



FAKE

Diplomatio

● Dutagan prokraston de la komenco de la 'Oficialaj diskutoj inter Usono kaj Demokratia Respubliko Vjetnamio' kaŭzis la solvado de proceduraj demandoj, i.a. tiu pri la lingvoj uzotaj. La 10-an de majo la delegacioj en Parizo interkonsentis, ke ĉiu flanko parolos en la propra lingvo — angla aŭ vjetnama — kaj ke ĉion diritan oni tradukos unue en la francan kaj poste en la alian 'oficialan' lingvon.

● Laŭ depeŝo de Associated Press, 2 apr 68, la korespondanto de la Sveda Radio Olle Steinhölm, raportante pri intervjuo kun la nord-vjetnama ambasadoro en Praha, avertis, ke li parolis germane kun la ambasadoro, ke estis malfacile kompreni, kion diris la diplomato, kaj ke sekve povas esti miskomprenoj en lia raporto.

Komerco

● Tri internaciaj foiroj ĉi-jare reklamas en Esperanto: Budapeŝto kaj Padova eldonis novajn prospektojn; Barcelona eldonis afiŝojn. Oni petu ilin de la koncernaj foiraj oficejoj.

Konferencoj

● La Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Nutraĵoj kaj Agrokulturo (FAO) decidis akcepti la araban kiel 'limigitan laborlingvon' kaj enkonduki interpretadon en la germana en estontaj ĝeneralaj konferencoj kaj eŭrop-regionaj konferencoj.

Literaturo

● La ĉefajn premiojn de la Internaciaj Literaturaj Konkursoj ligitaj al la Itala Esperanto-Kongreso (aprilo) gajnis Stefano Nemere kaj Wouter Pilger (poezio), kaj Hans Michael Maitzen kaj Jean Champion (prozo).

Ornitologio

● Ornitologia Rondo Esperantlingva (kunlaboranta faka asocio de UEA) proponas premion de 1000 belgaj frankoj (278 steloj) al tiu membro, kiu dum 1968 verkos la plej bonan tekston pri la naturo por la revuo 'La Mevo'.

Teknikistoj

● Okdek teknikistoj en 5 landoj partoprenis la 2-an konferencon de la Teknika Ligo de ISAE, en la kadro de la Budapeŝta Specimenfoiro en majo. Okaze de la konferenco multaj hungaraj fabrikoj eldonis prospektajn en Esperanto. Dek ok raportoj traktis diversajn teknikajn branĉojn.

Teozofio

● La brazila revuo 'O Teosofista' komencas rubrikon pri Esperanto. Verkas ĝin la fakdelegitino de UEA f-ino Yolanda Costa (C.P. 3881, ZC 00, Rio de Janeiro), kiu krome alvokas sendi al ŝi materialojn por Esperanto-ekspozicio en la Tutamerika Kongreso de Teozofio (septembro).

Turismo

● Aperis novaj prospektaj en Esperanto pri Liptovský Mikuláš (Ĉeĥoslovakujo), Baranya kaj Gyula (Hungarujo — tiu pri Gyula 36-paĝa), Irlando/Aer Lingus kaj Västernorrland (Svedujo). Oni petu ilin de la koncernaj turismaj oficejoj.

ESPERANTO EN RADIO



Ciujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1968, Unua Parto, p. 120. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ciutage

15.30-16.00 Warszawa, 42.11 m (7125 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.35 m (9570 kcs), 31.01 m (9675 kcs), 25.39 m (11815 kcs), 25.09 m (11955 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
19.30-19.45 Budapeŝt, 240 m (1250 kcs), 75.09 m (3995 kcs), 42.25 m (7100 kcs), 41.55 m (7220 kcs), 25.19 m (11910 kcs), 19.79 m (15160 kcs), 16.77 m (17890 kcs), Radio Budapeŝt, Esperanto-disendoj, Budapeŝt VIII., Hungarujo.

Dimanĉo

11.00-11.30 Pekino, 4769 m (6290 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
12.30-13.00 Pekino, 25 m, 19 m. I.
12.30-13.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K. Radio Clube de Sorocaba (São Paulo), Brazilo.
20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.40 m (11810 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
21.30-21.45 Teresina, 210 m (1430 kcs), 88.63 m (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.
21.45-22.00 Manila, 25.17 m (11920 kcs). P. Far East Broadcasting Co., Box 2041, Manila, Filipinoj.
23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lundo

12.05-12.15 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.80 m (17855 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
17.30-17.40 Bratislava, 428 m (701 kcs), 273 m (1097 kcs), 243 m (1232 kcs), 188 m (1594 kcs). K. Radar, Lenin-placo 13/a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo.
17.30-17.45 Stoke-on-Trent, 94.9 Mcs (mod. frekv.). K.I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (la kvaran lundon de la monato, de 17.30 ĝis 18.00; kelkaj programeroj en la angla lingvo).
22.45-23.00 Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

Merkredo

9.45- 9.55 Bratislava. Kiel lunde.
6.45- 6.55 Gdańsk, 230 m (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.
12.05-12.15 Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).

13.45-14.00 Wien, 203 m (1475 kcs), P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. (ĉiun alternan merkredon).
18.45-19.00 Resende, 196 m (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
23.05-23.30 Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.

Ĵaŭdo

10.00-10.15 Manila. Kiel dimanĉe.
21.50-22.00 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs). P. (D-ro Baur). 25.25 m (11890 kcs), 19.60 m (15305 kcs).
23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.
23.05-23.20 Beograd, 439 m (683 kcs), 48.78 m (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).

Vendredo

13.15-13.30 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fe), Argentino.
20.00-20.30 Pekino, 45.32 m (6620 kcs), 45.17 m (6640 kcs), 42.37 m (7080 kcs), 30.43 m (9860 kcs).

Sabato

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
20.00-20.30 Pekino. Kiel vendrede.
21.50-22.00 Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).

NOTO: La stacioj Bern, Budapeŝt, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

RADIO ROMA. 7-VII, Tra la literaturo; 14-VII, Novaĵoj el Italujo; 21-VII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 28-VII, Leterkesto; 4-VIII, La poemo "Al Silvja" de Giacomo Leopardi; 11-VIII, Canossa, la kastelo de la humiliĝo de Henriko IV al Gregoro VII; 18-VIII, La pentraĵoj de Correggio en Parma; 25-VIII, La etruska urbeto Norchia. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".

PRECIZIGO

Je pluraj demandoj la redakcio informas, ke en la intervjuo inter la redaktoro kaj prof. Lapenna, aperinta en la maja "Esperanto", estis ellasita la lingvo, en kiu aperos la nova verko pri soveta kriminaljura politiko (p. 68). Tiu faka verko estas anglalingva kaj aperos ĉi-jare sub la titolo "Soviet Penal Policy".

LA JUNA VIVO



**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z., Nederlando**

VIA LASTA SANCO – TARRAGONA !

Espereble vi, ricevante ĉi tiun numeron de LJV, jam aliĝis. Tiam certe interesas vin jenaj novaĵoj.

S-ro D. Eugenio López, Junulara Nacia Delegito, alta hispana funkcio, akceptis esti la Honora Prezidanto de la 24-a I.J.K.

La ĉi-kuna foto montras ne la kongresejon, sed la novan, inaŭgurotan, HEJS-restadejon. Zamenhofstrato, apuda al ĝi, samokaze ricevos sian nomon.

La Oratora Konkurso altiras jam plurajn partoprenantojn. Eksterkonkurse prelegos Jaime Aragay Pujols pri "Scienca progreso kaj vivkreado en la laboratorio". Ĉu nova metodo por bredi esperantistojn?

Fine de aprilo la statistiko montris 63 aliĝintojn. Se vi ne jam aliĝis vi havas lastan eblecon nun sendante 30 dol. aŭ 35 dol. (ĝis 20 j. resp. inter 20 kaj 25 j.), kaj aliĝilon. Se vi estas JMA aŭ MA-K de UEA vi pagu 27 resp. 32 dol. Se vi deziras "protekti" la kongreson, vi pagu 5 dol., kaj vi ricevos dokumentojn kaj insignojn.

Aliĝilon volonte ricevos Salvador Aragay, Str. Arce 8-2-4, Cornellà, (Barcelono); la kotizon sendu al: Banco Central, Plaza de Cataluña, 23 Barcelona, España, para abonar a Caja Iberica de Credito y Ahorro Sucursal Urbana N° 3 Cornellà de Llobregat, S-ro Salvador Aragay cta. 121. Ĝis revido en Tarragona!



Skoltoj kaj telegramoj:

EK AL ESSEX

La 27-an de julio la 6-a internacia skolta ĵamboreo Essex akceptos milojn da skoltoj, plejparte britajn, sed ankaŭ centojn el ekster-

lando. Kiom el ili scios paroli Esperanton, kiel tion petis kaj rekomendis al ili plurfoje la organizantoj?

S-ro Tom Parrinder, la ĉeforganizanto, kiu lernis kun sia stabo la lingvon dum pluraj monatoj, ricevis kelkajn kuraĝigajn reagojn. En ĉiuj oficialaj tekstoj, Esperanto estos la sola lingvo apud la angla. Funkciuloj de Skolta Esperantista Ligo helpis prepari menuojn, afiŝojn, kantojn, ludojn kaj konkursojn, frazaron kaj librobudon. La rubrikon en la ĉiutaga ĵamborea gazeto redaktos s-ro Raif Markarian.

La brita Ĉefskolto Sir Charles Maclean solene fermos la Ĵamboreon je la 2-a de aŭg., kun ĉeesto de la brita Internacia Komisaro kaj liaj viculoj, la internacia sekretario, kaj aliaj moŝtoj.

Se vi, ne estante skolto, ne partoprenos, tiam nepre sendu **telegraman saluton, en Esperanto**, nome de via klubo, unuiĝo aŭ instanco, je la momento de inaŭguro aŭ fermo, al s-ro Tom W. Parrinder, Scout Jamboree, "Belchamps", Hawkley, Hockley, Southend-on-Sea, Essex, Britujo.

MEZE EN LA SOMERO

tamen jam pripensu, ke vintro venas. Tio estas ĝojiga penso pro tio, ke vi povos viziti denove internacian seminarion de GEJ, la 12-an, en Kolonjo (Köln). Datoj: 27 dec.-3 jan. Temo: Sociologiaj aspektoj de l' nuntempo. Etoso kaj kvalito: kiel kutime, aŭ eĉ pli bonaj.

Petu cirkuleron ĉe GEJ, Postfach 2113, 85 Nürnberg 2. Orienteŭropanoj aparte rapide kontaktu pri invitiloj.

Post la seminario, de 2 ĝis 5 jan. 1969, la postvivantoj povas partopreni seminarion por gvidantoj de TEJO kaj NEJOj.

**ARGENTEJO HAVIS SIAN DUAN KONGRES-
SON**, en Río Ceballos, kun multpromesaj rezultoj. Nova estraro disdividis la kreskantan laborŝarĝon. Pri "Pasporto" kaj eksterlandaj rilatoj restas funkcia Ruben Feldman-Gonzalez sed nova triopo transprenis la gvidadon en la lando. "Perspektivo" aperos presita kun komercaj anoncoj, sub redakto de José Matucci. Lia adreso: Lavallo 1925, Florida, Buenos Aires. La rilatoj kun la Arg. E-o-Ligo pliboniĝis Nova loka grupo establiĝis en Kordobo. 25 gejunuloj ĉeestis el 7 urboj, ĝis 1000 km. foraj! La radio vizitis la kongreson.

En 1969, 15-18 febr., okazos la 3-a Kongreso apud Rosario. 5 eksterlandaj junuloj rajtos ĉeesti senpage.

MEMORINDA

Kongresorganizantoj sendu siajn, eĉ tre provizorajn informojn al la Turisma Servo de TEJO, **ĝis la fino de septembro 1968**. Se ili ne faros, la T.S. garantias, ke la koncerna aranĝo ne aperos en la oktobra kongreskalendaro, eldonoj en Esperanto, franca kaj angla lingvoj. Adreso: A. Grzebowski, ul. M. Curie-Sklodowskiej 10/3, Bydgoszcz 9. (Pol.)

MEMORIGA KALENDARO

Por la periodo julio-septembro la legantoj bv. konsulti la kalendaron en la maja "Esperanto", p. 75. Ni publikigas ĉi-foje nur la aldonojn.

Aŭgusto

4 Turista Renkontiĝo, M. Vitoŝa, Bulg.
10-17 Junulara Postkong. SAT, Delft, Ned.
18-21 Int. Renkontiĝo, Szolnok, Hungarujo
24-25 Ornitologia Semajnfino, Eindhoven

Oktobro

13-19 Feriaj Kursoj, Arhus, Danlando
15 Gen. Konferenco Unesko, Parizo
24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Decembro

10 Tago de Homaj Rajtoj
15 Zamenhof-Tago, Libro-Tago
27-31 Int. Sem. GEJ, Kolonjo
31 Kotizoj por UK Helsinki plialtiĝas

**Dekstre: Puerta del Sol en Toledo –
ekskursa celo de la 53-a Universala Kongreso.
La pordo estas araba arkitekturaĵo.
Ĝis la momento de redakto aliĝis
al la Universala Kongreso en Madrid
1557 personoj el 37 landoj.**



OFICIALA INFORMILO

N-ro 414, 1 junio 1968


NOVAJ FAKAJ ASOCIOJ KUNLABORAS KUN UEA

Kontraktoj subskribitaj inter UEA, unuflanke, kaj ITEA (Internacia Turisma Esperanto-Asocio) kaj UIEA (Universala Invalida Esperanto-Asocio) aliflanke, altigis ĝis 28 la nombron de la fakaj kaj specialaj organizaĵoj aliĝintaj al UEA aŭ kunlaborantaj kun ĝi.

La kontraktojn aprobis la Komitato de UEA la 31-an de majo 1968. Ili antaŭvidas reciprokan informadon, interŝanĝon de servoj, publikigon de informoj kaj varbadon de membroj.

La adreso de ITEA estas ĉe ĝia prezidanto, s-ro M. Jaumotte, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo. Tiu de UIEA, kiun gvidas s-ro M. Heidun, estas: Box 5, DK 5594 Strib, Danlando.

**La grafikajo ilustras, kiel konstante dum
la pasintaj 20 jaroj UEA larĝigis siajn rilatojn
kun aliaj Esperanto-organizaĵoj.**



NOVAJ DELEGITOJ

BELGUJO

Kalmthout 4 500. D & FD (Zoologio): Wim De Smet, biologo, Wilgendreef 14, Heide.

BRAZILLO

Atibala (São Paulo) 24 000. D & FD (Radio-amatorismo: PY2-EQS), (Religio: Spiritismo): Antonio de Padua Soares, bankoficisto, Caixa Postal 65.

Fortaleza. FD (Medicino): Alcimo Cavalcante de Aguiar, kuracisto, Carolina Sucupira, 400; tel. 4-03-60.

São Miguel Paulista. FD (Filologio), (Religio: Katolikismo): Euclides Carneiro da Silva, profesoro, Caixa Postal 82.

São Paulo. FD (Astronomio): Igor Colonna Valevski, sekretario, Caixa Postal 5888; tel. 51-1178. FD (kalkulsistemo dozena): la FD (astronomio).

BRITUJO

Cosby (Leicestershire). D: Frederick J. Swan, ŝtrump teknikisto, 7, Brooklands Road.

Tamworth (Staffs.) 35 000. D: C. Quayle, instruisto, 82, Mildenhall; tel. Tamworth 4949.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Prievidza (Slovensko) 32 000. D: Dezider Koronczy, ekonomo, Nábrežie Metoda 1707/16; tel. 3735.

FINNLANDO

Jyväskylä. VD: F-ino Sirkka Järvinen, kasis-tino, Gummeruksenkatu 3 A 4; tel. 941-19715.

GERMANUJO

D-516-Düren: vidu Merken.

D-5161-Merken (Nordrhein-Westfalen) 3 000.

D & JD & FD (Historio) & FD (Lingvistiko: latinida kaj eŭskera): Uwe J. Moritz, gimnazia instruisto, Andreasstr. 57; tel. (02421) 81916.

D-2252-St. Peter-Ording (Schleswig-Holstein) 4 000. D: Dirk Willkommen, instruisto, Dorfstr. 28.

HISPANUJO

Cheste (Valencia) 10 000. D: Enrique Arnau, terkulturisto, Trinquete 16.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1968)

Brazillo: Itabuna. **Britujo**: Birstall. **Francujo**: Caen. Roubaix (D). **Nederlando**: Velp. **Rumanujo**: Ciorani-rn. Mizil. **Usono**: Glendale.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

254 Melo, s-ro Roskildes Per. de, Brazillo. 255 Hamilton, s-ro J.; 256 Sinclair, f-ino P. C., Britujo. 257 Hansen, s-ro Holger; 258 Jahn, s-ro C. J.; 259 Neergaard, D-ro Paul; 260 Schröder, s-ro Ole; 261 Zacho, s-ino Birthe, Danlando. 262 Mikkola, s-ro Jalmari; 263 Teukku, s-ro Tuomo, Finnlando. 264 Kroon, s-ino J., Nederlando. 265 Andreasson, s-ro B.; 266 Carrfors, s-ino S.; 267 Silard, s-ro Szabad; 268 Stenström, f-ino Signe; 269 Stridell, s-ro Kaj, Svedujo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Golden, s-ro Bernard, Nairobi, Kenjo.
Holt, s-ino Patricia M., Sandown, Britujo.
Johansson, s-ro Nils, Norrköping, Svedujo.
Nordlöf, s-ro Bengt, Boden, Svedujo.
Urmeneta, d-ro Fermín de, Barcelona, Hispanujo.

DONACIOJ POR GENERALA KASO (Gld.)

Belgujo: Demesmaeker, s-ro, 27,50. Britujo: Davies, s-ro H., 25,80. Francujo: Belhoste, s-ro., 70,—. Hispanujo: Bohigas, s-ro A. 1,03; Purull, s-ro D., 6,17; Perarnau, s-ro J., 14,40. Nederlando: Moerbeek, s-ro R. 100,—; Termaat, F. P., 60,—. Svedujo: Carlén, s-ro E., 25,—. Usono: Barkley, f-ino M. L., 6,75.

FONDAJO HODLER (Gld.)

Svedujo: Carlén, s-ro E., 69,45.

FONDAJO CANUTO

(Por membrigi personojn en landoj kun trans-pagaj problemoj)

Nederlando: Sadler, d-ro V., 2 MA.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino, C.O.

INTERNACIAJ KONKURSOJ 1968

Stato je la 31-a de majo 1968

Konkurso I

Pozicio	lando	kvoto	poentoj	%
1 (4)	Italujo	3816	3655	95,78
2 (11)	Danlando	2764	2510	90,81
3 (1)	Nederlando	5322	4770	89,63
4 (2)	Svedujo	6415	5595	87,22
5 (8)	Usono	4144	3460	83,49
6 (3)	Britujo	6095	5032	82,56
7 (7)	Jugoslavio	3792	2975	78,45
8 (6)	Finnlando	2608	2025	77,65
9 (5)	Francujo	7234	5613	77,59
10 (9)	Brazillo	3188	2199	68,98
11 (10)	Svislando	1949	1335	68,50
12 (13)	Hispanujo	2919	1835	62,86
13 (12)	Germanujo	6579	3910	59,43
14 (14)	Belgujo	1912	1125	58,84
15 (15)	Japanujo	3829	2090	54,58

Konkurso II

1 (1)	Grekujo	250	387	154,80
2 (2)	Aŭstrujo	1270	1125	88,58
3 (3)	Kanado	955	825	86,39
4 (6)	Israelo	488	405	82,99
5 (4)	Sud-Afriko	250	205	82,—
6 (7)	Aŭstralio	1327	1059	79,80
7 (11)	Argentino	693	533	76,91
8 (5)	Madagaskaro	250	187	74,80
9 (8)	Nov-Zelando	1265	655	51,78
10 (9)	Norvegujo	1460	715	48,97
11 (10)	Islando	250	105	42,—

(Reguloj aperis en februaro, p. 31. Interkram-paj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn).

KORESPONDEMULOJ!

Se vi publikigos korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉi-monate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

Tarifo sur la dua kovrila paĝo. Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 86, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Cu vi estas ĝuste informita pri la katolika eklezio kaj ĝia tutmonda agado? Abonu la organon de I.K.U.E., ESPERO KATOLIKA. Jarkotizo svisaj fr. 13.— Mendebla ĉe: Centra Oficejo de IKUE, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando.

U.F.E. ĵus reeldonis "ABC d' Esperanto à l' usage de ceux qui aiment les lettres", franc-lingva verko de prof. G. Waringhien, prezidanto de la Akademio. La unuaj mendintoj ricevos dediĉitan ekzempleron de la aŭtoro. Mendu tuj ĉe UFE, 34 rue de Chabrol, Paris (10ème). Prezo 3,50 fr.fr. plus afranko.

La Eldona Societo Esperanto volas establi kontakton kun personoj, kiuj volas verki, traduki aŭ kontroli manuskriptojn. Interesatoj sin turnu al s-ro Bertil Nilsson, Rödkullastigen 2 A, 214 57 Malmö S, Svedujo. Nepre ne sendu manuskriptojn nepetite!

Mi estas ege interesita en la kolektado de malnovaj Esperanto-revuoj. Skribu al: R. Molera, Sta. Joaquina, 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Italaj ĝeinstruistoj, ĝeoficistoj, ĝestudentoj ekde 11-jaraĝaj deziras korespondi tutmonde. Respondo certa: Esperanto-Grupo, Prof-ino Ines Corona, via Milano 4, 09100 Cagliari, Italujo.

Brazilano, 22 j. studento, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun la tuta mondo. Adreso: Mauro Pamplona, General Padilha no. 172, Rio de Janeiro - 08.

Dankesprimo. Al ĉiuj, kiuj sendis poŝtaĵojn dum mia restado en la malsanulejo koran dankon. La kortuŝa simpatio multe helpis al mia resaniĝo. Mi pretas korespondi kun filatelistoj. Hermano Hoogland, Markgraafaan 61, Vlaardingen, Nederlando.

Dum aŭgusto mi luigas loĝejon en turisma urbeto. Skribu al: S-ro René Debernardi, P.R., 26 Crest, Francujo.

Italujo. — Helpas turistojn, entreprenojn pri vojaĝorganizoj, aŭtobusluado, vojaĝgvidadoj. Havigas komercajn, financajn informojn. Eksportas filtrilojn por ĉiuspecaj motoroj. Deziras interrilati lertajn finnlandajn gesamideanojn por gastinterŝanĝo. Angelo Lovati, 20144 Milano, Lipari, 8. Naciaj gazetaj petataj represi.

Esperantajn librojn, eldonitajn en Brazilo, interŝanĝas per spiritistaj libroj eldonitaj esperante, france kaj angle. Prof. Wallace Leal, V. Rodrigues Pk 82, Araraquera, São Paulo.

Komencanta esperantisto deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj amatorajn fotografaĵojn. Volonte interŝanĝos mian personan fotografaĵon kun korespondantoj, kiuj faros same. Por klara adreso certe respondos. S-ro Robert Leahy, 703 Alexander Hamilton Drive, San Antonio, Texas 78228, Usono.

Vizitu Hispanujon sen lingvaj problemoj pere de Esperanto. Poŝtvortaro Esperanta-Hispana kaj Hispana-Esperanta. Sendu ses respondkuponojn al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona, kaj vi ricevos ĝin per rekomendita poŝto.

Seriozan interŝanĝadon de neuzitaj kaj uzitaj poŝtmarkoj laŭ katalogo serĉas T. Reindl, ZNZZ, Prachatice, ĈSSR.

Mi ŝanĝos uzitajn ĈSSR-poŝtmarkojn kun samideanoj en ĉiuj landoj, peco kontraŭ peco, aŭ laŭ katalogo. Mario Vrsita, Netolice 333, Jizni, Cechy, ĈSSR.

S-ro Joseph H. Casto konigas al siaj amikoj sian novan adreson: Apartado Postal 653, Guadalupe, Jalisco, Meksiko.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, 5594 Strib, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj handikapitojn de tuta mondo. U.I.E.A. estas kunlaboranta fakasocio kun UEA.

La Esperantista Kolektanto... reaperas, petu specimenon kaj sendu tekston por senpaga anonco al s-ro R. Melo, 15 rue de la Richelandière, 42 St. Etienne, Francujo.

VIZITANTOJ AL LA C.O.

La C.O. volonte akceptas vizitantojn por montri al ili la propran domon de la Asocio kaj la funkciadon de la laboroj. Ili venu prefere inter la 13-a kaj 14-a horoj aŭ inter la 17-a kaj 18-a. Ili ne forgesu, ke la ĝeoficistoj ĉiam havas multe da laboro, kaj ili do ne restu pli ol duonan horon, se ili ne havas iun specialan temon por pritrakti.

GRAVA ATENTIGO

Pluraj oficistoj de la Centra Oficejo forestos dum la fino de julio kaj unua duono de aŭgusto pro la Universala Kongreso kaj pro liber-tempoj. Pro tio bv. prefere ne skribi al la Centra Oficejo dum la menciita periodo.

EN LA FAMA SERIO
ORIENTO-OKCIDENTO (N-RO 6)

REGO LEAR

160
paĝoj
21 x
15 cm.




Bind.
16,50 gld.
Broŝ.
14,— gld.

Unu el la plej grandaj kaj emociaj dramoj de William Shakespeare, **REGO LEAR** nun aperis en la definitiva traduko de

K. KALOCSAY,

memore al la 350-jara datreveno de la morto de la aŭtoro. Brilkvalita teksto, bela bindo, formato de "Naŭzo", "Kalevala" ktp.

Eldono de Universala Esperanto-Asocio



Unesteno

Universala Esperanta Stenografio
Nepraĵo por ĉiu
Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich

APERIS DUA ELDONO

de la plej vaste uzebla anglalingva dokumento de CED:

"Basic Facts about the International Language Esperanto" (Doc. RDC/7)

Tute reviziita kaj ĝisdatigita teksto.
Prezo: 0,50 gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA

BELARTO

estas la titolo de du grandformataj kajeroj redaktitaj de William Auld. Ili enhavas po 70 paĝoj da noveloj, artikoloj, poemoj kaj ilustraĵoj varie elektitaj. Eldonis UEA.
Prezo: po 2,— gld. (8 steloj).

Konatiĝu kun NEDERLANDO



per bildoj — 64 koloraj, 17 nigrablankaj.
Fotolibro poŝformata, 104-paĝa, eldonis BRUNA
Kun priskribo historia, turisma, k.s.
Prezo: 3,50 gld. (14 st.; 1,— dol.)
Sola vendraĵo ekster Nederlando: UEA

Se vi serĉas facilan, tamen absorban
legajon, mendu

Sekretoj de la marestaĵoj

popularscienca libro de
Petar Giunio
pri la vivoriĉa Adria Maro.

144 paĝoj en la formato 23 × 15 cm., kun
78 apartaj ilustraĵoj.

Ĉe la fino troviĝas ankaŭ 7-paĝa terminaro.
Jen nur kelkaj el la 32 ĉapitroj:

*Kiel ekestis la maro kaj la vivo en ĝi.
Defendo per kemiaj armiloj.
Majstroj de kamuflado.
Vivaj elektraj baterioj.
Fiŝoj aŭdigantaj voĉon.
La maraj lupoj.
La vivo en malluma dezerto.*

Egale, kiu vi estas, — el tiu ĉi libro vi multon lernos!

Prezo: nur 5,— gld. (20 steloj) ĉe la Libroservo de UEA, Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Poŝta ĉekkonto: 37 89 64.

Nepre havinda...

Esperanto - English Dictionary

de
Montagu C. Butler
Akademiano

● Presita de Blackburn Times Limited

La plej bona angla Esperanto-vortaro
(recenzo de J. C. Wells en *Esperanto*)
tute nova verko... bonega... oni povas nur
miri, ke BEA povas liveri la libron kontraŭ
tiel malalta prezo! ...tre, tre ampleksa laŭ
enhavo

(recenzo de H. A. de Hoog en *Dia Regno*)

Prezo: 25 ŝilingoj (43 steloj) (afranko 1 ŝilingo)
Mendu: ĉe la eldonisto BRITA ESPERANTISTA ASOCIO aŭ ĉe Esperantaj Libroservoj.

● Impresite de la kvalito kaj prezo de
ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY, post
tutmondaj enketoj oni fine elektis Blackburn
Times Limited por la presado de **PLENA**
ILUSTRITA VORTARO.

1968

SESDEKJARA DATREVENO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**Helpu la kampanjon por fortikigo de UEA en
la Festa Jaro per aktiva varbado de novaj
individuaĵ membroj!**



Teksto: "Por la
Internacia Lingvo
— kontraŭ lingva
diskriminacio" —
"Jaro de Homaj
Rajtoj".

MEMORIGA GLUMARKO por la Jaro de Homaj Rajtoj 1968

Uzu ĝin vaste dum la tuta jaro!
Koloroj: ora, oranĝa, malhelblua.
Prezo: 0,50 gld. por 10 markoj. Eldono de UEA.

Konferenco pri

"Fundamentaj Homaj Rajtoj kaj Liberecoj"

Kun la temo "Fundamentaj Homaj Rajtoj kaj Liberecoj" okazos grava internacia kunveno por instruistoj en la komforta restadejo Sonnenberg (Harz-montaro), Germanujo.

Datoj: 20-29 sept. 1968.

Jam promesis prelegi prof. Lapenna kaj aliaj konataj parolantoj. Kotizo: 80 g.mk. por 10 tagoj, manĝojn kaj loĝadon inkluzive. Detale informas: Helmut Sonnabend, rektor, D-3161 Dollbergen über Lehrte, Germanujo.

